

LA VIVO ROZKOLORA

(La vie en rose)

Teksto esperantigita/verkita de Manŭel Rovere

Hela rigard', kvazaŭ knabin',
rideto dolĉa sur la buŝ',
jen la portreto sen retuŝ'
de l' virin', kiu ravas min.

Kiam ŝi brakumas min
kaj flustras el la sin',
la viv' rozkoloriĝas.

Ardajn vortojn el la kor'
ŝi diras sen pudor':
la sensoj ekscitiĝas.

Sentas mi, en la anim',
feliĉon preter lim',
neniam eĉ revitan.

“ Nur vi por mi, mi por vi en la mond' ”

ŝi diris kore en ĵur' por la vivo.

Kiam mi pensas pri tio,
akceliĝas la puls'
de mia kor'.

Noktoj de am' kvazaŭ sen fin'
dum regas plena harmoni',
penojn forigas la pasi':
la temp' de ĝoj', ĝoj' sen lim'.

Se ŝi estas apud mi,
mi vidas dank'al ŝi
la vivon rozkolora.

Ŝvebas ĉirkaŭ mi muzik',
la mond' estas amik'
kaj ĉiu hom' bonkora.

Ŝiaj vortoj, ŝia spir',
samkiel eliksir',
min igas sendolora.

Elstaras ŝi en la plej bela rev'
kaj mi sopiras surlipen ŝin kisi.
Se mi estas apud ŝi,
la vivo ĉiam brilas,
ho jes, por mi.